

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 16.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. —
Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso
no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

Dr. STAN. KAMARYT:

NUNA SITUACIO DE LA LINGVA KOMITATO.

La eksplodo de la mondmilito okazis, kiam Lingva komitato estis dum vigla laborado. Kiam en jaro 1905 estis la unuaj membroj de la L. K. nomitaj de Zamenhof kaj aprobitaj de la Unua kongreso, estis multaj gravaj duboj pri ilia laborkapablo. Feliĉe en individualeco de E. Boirac ili havis gvidanton de tute eksterordinara laboremo kaj talento. Li sukcesis, nature post iom da jaroj, eklaborigi la komitaton kaj ĝia daŭra laboro efektive alportis por evoluo de la lingvo tre atentindajn rezultatojn. La pléj grava estis »Unua oficiala aldono al Universala vortaro« aperinta en j. 1909, kies saĝa malbanilemo kaj severa kritikemo ĉe oficialigo de radikoj, kiu permesis akcepti sole malmulton, volante per tio multon doni, ne povas esti sufiĉe alte ŝatata. — En tiu leksikologiaj laboraj la L. K. daŭris labori kaj en julio 1914 preparis liston de »internaciaj vortoj, kiuj laŭ § 15. de Fundamento estas esperantaj« kaj finis liston de novaj oficialigindaj radikoj, sed la militaj cirkonstancoj malebligis ilin aperigi. Tio povis okazi nur post la milito, kiam ambaŭ listoj aperis en j. 1919. kiel »Dua oficiala aldono al Univerasala vortaro« en speciala broŝuro.

La preferata labormetodo de L. K. estis la metodo analiza, tio estas, ĝi esploradis laŭ kutima metodo filologia verkojn esperante skribitajn kaj kolektadis la en ili uzitajn vortojn kaj parolturnojn kaj penis per komparo kaj statistiko de ofteco konstati la taŭgecon kaj oportunecon de la novaj formoj. La dua ebla labormetodo, t. e. ŝinteza kreo de novaj formoj radikaj kaj parolturnaj, kvankam ĝi teorie tre taŭgas por la artefarita lingvo, estis uzata malofte. Verŝajne la Idistaj timigul-

oj kaj timigaĉoj mallogadis for tiu vojo. Sed oni ne povas malkaŝi, ke eĉ per la sola metodo unua oni ricevis bonajn rezultatojn. Multaj el la lingvaj studoj publikigitaj en Oficiala gazeto e. estos ankoraŭ post jaroj zorge trailegataj.

Sed pro la milito plej multe suferis la funkciado de la L. K. mem, kio estas tre komprenebla. Tamen sukcesis al la laborantoj de la Centra oficejo daŭrigi ĝian ekziston dum la tuta milito, kaj eĉ aperigi de tempo al tempo numerojn de la Oficiala gazeto tiel, ke la 11 numeroj de la VII. volumo plenigis la tempospacon junio 1914 — majo 1920, kaj enregistris la plej gravajn esp. okazintaĵojn speciale: raporton pri la inaŭgura kaj samtempe ferma kunveno de la X. kongreso, pri la XI. kongreso en San Francisco 23.—28. aŭguston 1915, pri mortoj de Zamenhof (14./IV. 1917) kaj Boirac (20./IX. 1917) kaj post la armistico kaj paco oficialan raporton pri Esperantista konferenco en Paris 21.—25. septembron 1919. Al tiu ĉi konferenco estis per Centra oficejo invitataj diversaj konataj esperantistoj kun kiuj estis poveble per poŝto rilati kaj la konferenco (en kiu pro la tiamaj cirkonstacoj partoprenis sole Francoj kaj du Angloj) koncentris siajn pritraktojn en deziresprimojn, ke L. K. kaj K. K. K. reorganizu sin kaj ekfunkciu. Baldaŭ montriĝis, ke tio estas ebla, ĉar jam en numero de 25./I. 1920 Oficiala gazeto povis doni liston de restintaj L. Komitatanoj, en kiu jam troviĝis plimulto de anoj kiuj deklaris sin pretaj denove komenci labori. Tiel estis eble jam 12./V. 1920 fini elekton por vakantaj postenoj de E. Akademio, kiu ricevis poste tiun membraron: Cart, Christaller, Corret, Evstifejev, Grabowski, Grosjean-Maupin, Ingolda, Kühnl, Lengyel, Mybs, Nylen, Privat, Saussure, Wackrill, Warden, Mankas sole elektiti prezidanton kaj la L. K. povos eklabori laŭ la antaŭmilita maniero. Sed ĉar ĝi havas jam tradicion, oni povas rajte

esperi, ke ĝi laboros pli rapide kaj pli ekonomie ol antaŭ la milito.

Estas granda merito de la Centra oficejo, ke ĝi ebligis la kontinuecon de la L. K. Sed la Centra oficejo bedaŭrinde ne vivas ankoraŭ el siaj propraj rimedoj, el enspezoj de tiuj, kiuj uzas kaj bezonas ĝiajn servojn, de esperantistoj, sed ĝi ricevas monan helpon de malavaraĵ protektantoj precipe de generalo Sébert. Tio ne povas daŭri senfine, tial oni nun organizis C. O. kiel anoniman kooperativan societon kun varieblaj kapitalo kaj oficistaro kaj por protekti ĝin finance oni fondis »Societon de amikoj de esperanto«. Ĝi havas membrojn asociajn, kiuj partoprenas en ĝia administrado kaj aliĝintajn, kiuj alportas al ĝi sole sian helpon kaj aprobon. La asociaj membroj pagas 25, la aliĝintaj 10 frankojn francajn por jaro. Kvankam la valuta diferenco faras por ni la kotizaĵon tro altan, tamen estas tre rekomendinde se ankau el Ĉeĥoslovakio aliĝu iom grava nombro de membroj. Adreso de la societo estas Paris, 51 rue de Clichy.

Oni ofte kritikis la laboremon, la laborkapablon kaj la laborrezultaton de la L. K. Mi pensas, ke la kritikistoj ofte estis malpravaj; estas certe menia miro kaj sekvis el la tuta origino de la L. K., ke necese daŭris iom da jaroj ol la korpuso tiel diversnacia, diversklera, diversriĉa, diverslaborema dissemiĝita en la tuta mondo komencis labori. Mi pensas ke oni ŝultas al la eksterordinara talento de Boirac, ke la vico da nelaboraj jaroj ne estis pli longa. Sed kiam L. K. eklaboris oni ne povas rifuzi al ĝiaj laboroj la kvaliton de la seriozeco. La ioma konservativismo en ĝia labormaniero, kiu defendis kelkafoje spiritojn rekte pensantajn, estas ĉe oficiala institucio, kiu volas kaj devas fari devigajn decidojn ne sole komprenebla sed necesa kvalito. Malrapideco de la decidado malfaciligas decidojn neprimitivajn, hazardajn kaj eksperimentajn. La milita pauzo en la lingvaj laboroj estas la plej efektiva malutilo.

Pro tio mi pensas, ke oni devas kun ĝojo saluti sciigon pri nova vivo de la L. K. kaj peni, precipe per abono de Oficiala gazeto, ke ĝi daŭre bone funkciu laŭ morala kaj materiala vidmaniero. Precipe ankaŭ oni devas konsili, ke la funkciado de L. K. kaj Akademio ne estu kunigata kun iu ajn alia esperantista organizacio, estu tiu ĉi eĉ la plej meritplena, kiel estus volontaj kelkaj voĉoj en la Haaga kongreso. La sendependeco estas ĉefa kondiĉo de ĝia laborkapablo kaj autoritato.

Bratislava, 20./X. 1920.

ESPERANTISMO

XIII. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

1921 en Praha (Ĉeĥoslovakio).

III. Komuniko.

Dato. La XIIIa akazos de la 31a de julio ĝis la 6a aŭgusto 1921.

Komitato. Dro St. Kamaryt kaj A. Pitlik estis elektitaj anoj de K. K. K. por la XIIIa en Praha.

Kongresejo. Solena malferma kunsido okazos en la »Smetana« halo de la reprezentanta domo, laboraj kongreskunsidoj kaj akcepto en la Kazino sur insulo »Žofin«.

Subkongresoj. Sub protektorato de prof. Dr. Cart okazos samtempe subkongreso de la blindaj esperantistoj. En la programo estas paroladoj pri la socia vivo kaj organizado de la blinduloj kaj internacia koncerto de la blindaj virtuloj kaj kantistoj.

Fakaj kunvenoj. Katolikoj — organizanto So Zelenka, Kristanoj — kaj vegetaranoj — So Tutsch, hebreaĵ nacioj So Heller.

Kozitaĵo. La sumo kaj maniero de la monsendo estas baldaŭ komunikotaj. Aliĝoj: 9. So Kronenberg el Bydgoszez, 10. So Taubmann, Haida, 11. So Bruijn, s-Gravenhage, 12. Fino Flourens »Rok-sano«, Beziars, 13. So Toorens, s-Gravenhage, 14. generalo Sebert, 15. Sino Sebert, 16. Fino Sebert, 17. Fino Royer, 18. So Chavet, 19. Sino Cense, 20. Fino Gérard, Paris, 21. So Sevenhuijsen, 22. Fino Sevenhuijsen, Haarlem, 23. So Tarnow, Kiel, 24. So Neužil, 25. Sino Neužilová, Neředín, 26. So Heek, Hengelo, 27. Dro Möbusz, Lübeck, 28. So Tinteren, Amsterdam, 29. Sino Heller, 30. So Heller, Litoměřice.

Garantia fundo. Enskriboj po 100 ĉeĥoslovakaj kronoj. La garantiantoj pagos laŭproporcie nur, se post la kongreso pruviĝus, ke la kongresaj elspezoj superus la enspezon. Garantia precipe gesamideanoj el landoj kun pli bona valuto!

Donacoj. So van Heek el Hengelo (Nederland) 30 G. N. Gekursanoj de Fino Janalíková en Bystřice p. H. 120 K, Esperantista klubo en Praha 111 K, Esperantské sdružení (So Hromada) 100 K, Rondeto de Esperantistinoj en Praha 75 K, So Paša, Muglinov 20 K, So Pilaš, M. Ostrava, So. Novák, So Budinský, Fino Meisnerová el Poděbrady po 10 K, Junularo de E. K. en Praha 2 K 10 h.

Deponado de la mono en Praha. Geesperantistoj intencantaj deponi en Praha monon, sendu pere de kiu ajn banko al la banko »Bohemia« en Praha je la konto de la XIIIa Universala Kongreso de Esperanto sian sumon en ĉeĥoslovaka valuto. La kongresa monŝanĝejo elpagos al Vi ĝin (laŭ la kurso de la tago de la monakcepto) kun procentoj. Pri la monsendo sciigu ĉiam samtempe la ĝen. sekr. de la Loka K. K.

Adreso por nur prikongresaj korespondajoj kaj oficialaj aliĝoj: So A. Pitlík, Praha III., Nerudova 40. (Por respondo aldoni respondkuponon aŭ naciajn poŝtmarkojn).

Por la Loka Kongresa Komitato

Aug. Pitlík,
ĝenerala sekretario.

oooo

LIGO DE LA NACIOJ KAJ ESPERANTO.

En la kunveno de la Ligo de la nacioj, la 9. de dec., estis tie prezentita sub no. 20 (48) 194. jena resolucio:

»La Ligo de la nacioj konstatante la lingvajn malfacilaĵojn, kiuj malfaciligas senperajn rilatojn inter la nacioj kaj la necesecon forigi ilin en la intereso de plena konsento de la nacioj, ĝi kun intereso sekvas la provojn pri oficiala instruado de la internacia lingvo E. en publikaj lernejoj de diversaj membroj de Ligo, kaj ĝi dezirus vidi, ke tiu ĉi instruado ĝeneraliĝu en la tuta mondo tiom, ke la infanoj de ĉiuj landoj konu estonte almenaŭ du lingvojn: sian gepatran kaj la alian kiu estas simpla kaj facila por internaciaj rilatoj.

La Ligo de la nacioj petas sian ĝeneralan sekretarion, ke li preparu por la venonta kunveno de la Ligo la raporton pri la rezultatoj, atingitaj sur tiu ĉi kampo.«

La resolucio prezentis: M. M. Octavio (Brazilio), Restrepo (Kolumbio), Doret (Haiti), Lafontain (Belgio), Huneus (Ĉilio), Wellington Koo (Ĉinio), Lord Robert Cecil (Suda Afriko), Schanzer (Italio), The Jam de Nawanager (Hindio), Dr. Beneš (Ĉeĥoslovakio), Emir Zoka en Dowleh (Persio).

La resolucio per si mem estas por la mondlingvanoj afero tre ĝojiga kaj oni tute prave povus esperi, ke la Ligo de la nacioj helpos forigi la lingvajn barojn, kiuj dividas la popolojn ankoraŭ dudek centjarojn post Kristo. — Bedaŭrinde tiel ne okazis: en sia ferma kunsido (la 18. dec.) la Ligo deklaris, ke ĝi sin ne okupos pri la mondlingva problemoj

oooo

NACIA VIVO

A. KLIMAS, red. de »Darbas«.
(Kaŭnas-Litovio.)

EL LA VIVO DE LITOVIO.

(Fino).

En tiu momento, kiam Litovio faris la pagon kun Rusio, la Poloj ankoraŭ tenis en siaj manoj Vilnon kaj aliajn litovajn urbojn. Malgraŭ tio, ke Poloj estis jam tiutempe malvenkitaj en rusa fronto, tamen ili sidis en Vilno kaj agis tiel, ke Vilnon ekprenu la Rusoj, sed ne Litovoj. Tiam ĉi la Poloj volis malpacigi Litovojn kun Rusoj, ke poste estu pli facile por ili batali kontraŭ Rusoj. Forlasante Vilnon, la Poloj metis kontraŭ litova flanko sian armeon, kies celo estis malhelpi por Litovoj eniri en Vilnon pli frue ol venos la Rusoj. Kaj tiu ĉi artifikajo iomete sukcesis. Litova armeo, dezirinta eniri en Vilnon pli antaŭe ol venos Rusoj, vole-nevole estis devigita konfliktiĝi kun Poloj. Rezultato estis tia, ke Poloj estis disbatitaj kaj multaj el ili kaptitaj.

Enirinte en Vilnon, la Rusoj sentis sin kiel mastrumantoj, ĉar ili vidis, ke ili la unuaj eniris en tiun ĉi urbon. De komence la interrilatoj kun la Rusoj estis tolereblaj. Sed kiam alveturis en Vilnon pli gravaj gvidantoj de komunistoj, tiam rusaj bolŝevikaj komisaroj fariĝis netolereblaj. Komunistaj agitantoj komencis tre insiste agitati inter la loĝantoj, ke oni deĵetu litovan registaron kaj fondu registaran sistemon de rusaj sovjetoj (konsilantaroj). Tamen plimulto de loĝantoj kaj precipe laboristoj kun granda indigno rigardis la rusajn ĵurpromesojn kaj atendis, ke la Rusoj kiel eble plej baldaŭ forlasu Vilnon kaj aliru litova potenco.

Kiam la Rusoj eniris en Vilnon, tuj multaj produktoj tre kariĝis kaj iuj komercaĵoj, precipe manĝaĵoj, tute malaperis. Krom tio rusaj bolŝevikoj multajn homojn arestis kaj pafmortigis, kiel kontraŭrevoluclulojn. Tamen tiaj agmanieroj pligrandigis nur malamon al rusaj bolŝevikoj. Kaj ĉiuj deziris, ke rusa ruĝa armeo forlasu litovan teritorion.

Ŝajnis, ke malgraŭ la farita packontrakto, ree ekflamiĝos la milito inter Rusoj kaj Litovoj. Litovaj vilaĝanoj komencis rapide organiziĝi en partizanajn taĉmentojn, por de ili povu helpi al litova armeo aŭ memstare defendi la landon kontraŭ la Rusoj. Sed okazis feliĉo, ĉar Moskva registaro, ekvidinte tian ekstreman reziston de Litova popolo, ordonis al siaj komisaroj, kiuj estis tiam en Vilno, ŝanĝi la taktikon

kaj agi laŭ la paca kontrakto. Pro tiu afero estis alvenintaj en Kaunas rusaj delegitoj por trakti kun litova registaro pri evakuado de Vilno. Interkonsento efektiviĝis, kaj Rusoj deviĝis forlasi la teritorion de Litovio. Sian promeson ili plenumis, restante nur por nelonga tempo apud Gardinas (Grodno), kies forlaso laŭ strategia vidpunkto estus por la Rusoj malutila, ĉar minacis pola armeo.

Nuntempe la interrilatoj kun Rusio estas jam normalaj kaj la ambasadoro de Rusio, sinjoro Akselrod, loĝas en la ĉefurbo de Litovio. Litovio havas sian ambasadoron en Moskva.

Kio koncernas la specon de la regado en Litovio, mi povas ne mensogante diri, ke tiu ĉi regado estas bazita sur demokrataj principoj. Kompare al Polio, Litovio prezentas en tiu ĉi rilato grandan diferencon, ĉar Litovio estas vere demokrata respubliko, regata de la popolo, dume Polio estas regata de grandaj bienposedantoj kaj imperialistaj elementoj, kiuj malestimas laboristan klason.

Konstitucia Sejmo (Konstituantaro) de Litovio estis kunvokita la 15-an de majo 1920. Konsisto de Sejmo montras politikajn direktojn de la tuta lando. Sejmo de Litovio konsistas el 112 membroj, inter kiuj estis elektitaj 4 virinaj deputitoj. Poste estas 10 alinaciaj deputitoj, t. e. 3 Poloj, 6 Hebreoj, kaj 1 (unu) Germano. Ĉiuj aliaj estas Litovoj. La deputitoj estas disigitaj je tiuj ĉi frakcioj: 59 kristanaj demokratoj, 29 socialistaj popolistoj-demokratoj, 14 socialdemokratoj, 6 Hebreoj, 3 Poloj, 1 Germano. Kristanaj demokratoj tial havas plimulton en Sejmo. Tamen ili cedas al socialistaj-popolistoj, kiuj en multaj okazoj estas gvidantoj. Tiu ĉi fenomeno venas de tio, ke kristanaj demokratoj estas elektitaj en Sejmon plej multe per la voĉoj de virinoj, dume la socialistoj estis elektitaj per la voĉoj de aktivaj homoj, aktive konstruantaj la sendependecon de respubliko. Tial ankaŭ la registaro de Litovio havas pli multe da socialistoj ol kristanaj demokratoj. Ekzemple, ministraro de Litovio konsistas: el 3 socialistaj popolistoj-demokratoj, 2 senpartiaj progresuloj kaj 1 moderna demokrato. Prezidanto de ministraro estas dro K. Grinius, socialista popolisto-demokrato.

Antaŭ ol estos ellaborita la definitiva konstitucio de Litovio, la kunveninta Konstitucia Sejmo akceptis provizoran konstitucion de respubliko.

Nuntempe Litovia Sejmo okupas sin per la ellaborado de tiaj leĝoj kaj reguloj, per kiuj oni povus solvi agraran demandon kaj fari tutan agraran reformon. Tiu ĉi

demando estas plej grava por loĝantaro de Litovio, ĉar Litovio estas agrikultura lando. Sed por solvo de tiu ĉi demando tre malhelpas la sudaj najbaroj de Litovio, t. e. la Poloj, kiuj estante subtenataj de Varsovia registaro kaj polaj legioj penas okupi la teritorion de Litovio kaj poste regi laŭ polaj leĝoj.

Poloj volas detrui la sendependecon la Litovia respubliko precipe tial, ke grandbienuloj de Litovio preskaŭ ĉiuj estas Poloj aŭ poliĝintaj Litovoj. Kaj la grandaj bienoj laŭ litovaj leĝoj estos konfiskataj, ĉar la normo de la terposedado estas limigita. Tial la juna kaj demokrata Litovia respubliko havas en siaj najbaroj, t. e. Poloj, grandajn malamikojn.

Jen kiel la polaj publicistoj kun granda fervoro penas disvastigi diversajn elpensajojn pri Litovio kaj ĝia registaro. Precipe en franca preso oni tre mensogas. Kaj tial la francoj, ne sciantaj la veran situation, ĉiamaniere helpas al Poloj kaj sendas al ili diversajn armilojn, kiujn ili jam ne unu fojon uzis kontraŭ la sendependecon de Litovia respubliko.

oooo

UNUA PROPONO POR KONSTITUCIIGI LIGON DE LA NACIOJ.

(Fino)

La Kolegio de la rajtigataj delegitoj, estante la plej alta institucio de la Ligo, decidu pri ĉiuj gravaj aferoj; ĝi decidu pri paco kaj milito, ĝi fiksnu nombron de militistaroj kaj unuspecan elpagon de soldataj salajroj, ĝi zorgu pri sia alprovizigo kaj disponigu konkeritajn teritoriojn. Ĝi starigu Ligan Tribunalon, havante senliman leĝdonpovon: la leĝoj estu formitaj »sur bazo de la natura rajto«.

La Liga Tribunalo, konsistante el juĝistoj kaj asesoroj, kunsidu en la sidejo de la Kolegio. Ĝi estu antaŭ ĉio tribunalo por regnestroj kaj ĝi posedu ankaŭ leĝdonpovon laŭ modelo de la tiama bohema landa tribunalo.

Kotizaĵoj por kovri ligajn elspezojn, estis de la Kolegio fiksitaj en sumo de tritagaj enspezoj de regnestro kaj regnano, ankaŭ parto de ekleziaj depagoj apartenis al la Liga kaso; la kotizaĵoj estis devigaj.

La ĉefa malhelpaĵo de la plano fariĝis la faktoj, ke al la Imperiestro, kiel germana reĝo estis donitaj nur la samaj rajtoj kiel al la ceteraj membroj de la Ligo (la reĝo franca estis preferata) kaj ke la papo ne divis aniĝi; al li estis donita ofico de peranto inter nemembroj de la Ligo kaj plie li estis helponta la laŭordan en-

kasigon de la ligaj kotizaĵoj per minacoj de ekleziaj punoj.

La brilo de Imperiestreco tiam pli kaj pli estingiĝis; kontraŭe la malatento pri la papaj mondpotenco kaj diplomatio kaŭzis malsukceson de la plano de Georgo de Poděbrady.

Akirante konsenton pri sia projekto en Polio kaj Hungario, Georgo komencis trakti en la okcidentaj regnoj, antaŭ ĉio en Burgundlando kaj en Venecio. Al Ludoviko XI. li sendis specialan delegitaron; la ĵurinta kontraŭulo de la papo nature bone komprenis profiton, garantiotan al li de simila federacio kaj li estis — ema la planon de Georgo subteni. Sed nun la papa diplomatio streĉis ĉiujn siajn fortojn kaj la pastraro sciis ĉiujn — post longa intertraktado — okazintajn kunsidojn malebligi; la plano de Georgo de Poděbrady estis tiel malaperigita por longa tempo, por nur nuntempe, post la monda milito, fariĝi aktuala, por ke ĝi nun en moderna, pli vasta formo fine por bono de l'homaro efektiviĝu.

El »Ĉeĥoslovaka Korespondo« tradukis
O Sklenička, del UEA.

oooo

ĈEĤOSLOVAKIO.

Sur erara vojo. De la fondiĝo de la Ĉeĥoslovaka respubliko la socialismo tie tre rapide kreskis kaj la politikaj eĉ ekonomiaj sukcesoj atingitaj de la laboristaro estas jam tre gravaj. Pro sia nombro la socialistoj havis la eblon iam post iam — laŭ ilia propra kapablo kaj metureco — atingi per parlamenta vojo ĉiujn siajn postulojn. Tial ili mem devas bedaŭri la disigon de ilia plej granda partio, nome la socialdemokrata, kiun kaŭzis ĝiaj bolŝevistaj ekstremistoj, videntaj en la nuna rusa fiŝoso kaj perfortado eĉ de la laboristaro mem, la idealan solvon de la nuna ĝenerala mizero. La ekstremistoj antaŭe ekkonis batalon en socialdemokrata partio kaj prenis al ĝi apartenantan »Popolan domon« en Praha kaj tie presatan centran organon »Právo Lidu«, elpuŝinte de tie la estiindajn defendantojn de la popolaj rajtoj Němec, dro. Soukup, Habrman k. a. Memkompreneble, ĉi tiuj ne povis agi alie el juĝe protesti kontraŭ la uzurpo. Sed la ekstremistoj ne ektimis, kontraŭe, ili ankoraŭ eksigis la direktoron de la presejo, kiun estis lege atribuita kiel ĝia responsa administristo. Post tiu ĉi ago la Magistrato de Praha (kiel komerca juĝejo) malpermesis pluan uzadon de la presejo kaj sigeligis ĝin. Sed la bolŝevistoj ne cedis. Ili proklamis la ĝeneralan strikon en la tuta respubliko kiel »proteston kontraŭ la perfortado de laboristoj« kaj inŝcenis en kelkaj urboj kontraŭŝtatajn tumultojn. Kaj unuanfojon en la respubliko estis uzataj pafiloj kontraŭ la propra popolo, unuan fojon fluis la sango, la sola posedado de laboristoj. Deko da kadavroj el Praha, Most kaj Oslavany, vico da orfoj kaj vidvinoj plendas al la mondo pri

malbona ago de malbonaj gvidantoj. La bolŝevistaj estroj tro malfrue konvinkiĝis pri malforteco de sia movado en Ĉeĥoslovakio: Krom en Kladno, la konata bolŝevista centro, nenie efektiviĝis la pene kaj eĉ perforte inŝcenata »ĝenerala« striko, kontraŭe, grandega parto da laboristaro decidigis labori kum pli intensa fervoro. La »revoluciaj komitatoj« kaj kune kun ili eĉ vico da iliaj helpantoj atendas en malliberejoj ne klaran solvon de ilia plej proksima estonteco. Tiel sukcesis la bolŝevista revolucio en Ĉeĥoslovakio. La vane verŝita sango de la malfeliĉaj oferoj devas atentigi la adorantojn de la sovjeta sistemo, ke ĉiu ajn atako kontraŭ la konstituciaj leĝoj estos en la nuna tempo energie rifuzita. La nuna stato de bolŝevismo en Rusio tute ne meritigas la sekvadon. Ĝiaj partianoj en aliaj landoj povas postuli sole neutralecon kontraŭ ĝi, ĉar ĝia estonteco estas ankoraŭ tre necerta. Se ĝi alkondukos la loĝantaron en Rusio al efektiva bonstato, tiam neniu potenco en la mondo povos malhelpi ĝian vastigon en aliaj landoj. Laŭ la ĝisnunaj spertoj la bolŝevismo pli multe meritigas la rifuzon ol subtenon, kial do verŝi la sangon por ĝi? Dr. Silaha.

Kontraŭ akaparo. Ministerio de la justeco prezentis al la parlamento proponon de la leĝo, laŭ kiu la akaparo estos punata per deviga laboro, ekzemple purigado de stratoj, riparado de vojoj, fervojoj kaj simile. La leĝo sendube estos akceptita!

LITERATURO

?)

Strangajn fortojn ekposedas jam homaro, sen distancoj estas jam planedo nia, tempojn, rekojn trapenetras homa vido, ekatakas kosmon, sen la fin' kaj limoj, la trezoroj de la ter' kaj vastaj maroj malfermiĝos al homaro avidega; unu restas nur kaj sola sekretaĵo — estonteco, kiun trapenetri vane la homaro ofte ekklopodis.

Ĉu ni povos scii kio post la tempo plena je doloroj kaj je konvulsioj sekvos, kien ondoj ŝetas nian ŝipon? Ĉu el sang' kaj varmaj larmoj disverŝitaj nova tag' ekbrilos, aŭ ĉu nokt' terura etendiĝos sur la kampoj, urboj, homoj senegala en la homa historio?

Pli ol nokt' malluma estas estonteco: ni ne povas scii, kion tag' venonta

*) Kun permeso de sino. Schulhofová ĵurantis al ni so. red. Weiner el Praha la notlibron de la mortinta poeto dr. Schulhof. Tie ni trovis skizojn por granda epopeo, sen titolo, kiun la mortinto preparis. Nun, kun ekmiro ni ricevis de so, dir. Poppe el Pardubice kelkajn foliojn kun versaĵoj, kiuj evidente estas enkonduko al la epopeo. Bedaŭrinde ĉio alia mankas.

al ni donos, kion al ni ruze prenos,
kaj neeble scii, ĉu okazintaĵoj,
kiuj senegalaj estas, senegzemplaj,
trovos foje iun, kiu ilin vestos
per vort' poezia, simile al tiu
kiu Troas urbon, la miniaturon
glorifikis por eternaj postaj tempoj.

Se mi forton havus, kaj rilatojn kun la
Musoj,

necesegajn por la task' simile granda,
ho, mi volus sur min preni tiun ŝarĝon,
kaj konservi por venontaj posteuloj
ĉion kio en la tagoj nunaj, plej pasiaj
ŝprucas el la koro de l'homaro,
ĉiujn agojn grandajn, preskaŭ

superhomajn,
sed eĉ zorgojn niajn, nekaŝante ombrojn.

Sed se mi eĉ havus tiujn grandajn fortojn,
se mi estus amatulo de la Musoj,
ĉu mi havus lingvon, lingvon vortoriĉan
kompreneblan al la homoj senescepte,
kiu apartenas al la mondo tuta,
tute same kiel nunaj grandaj tempoj
apartenos poste ne al rasoj, gentoj,
sed al mondo tuta, simple: al homaro.
Vane estus uzi mian lingvon patran,
lingvon kiu sonis ĉe lulilo mia —
en patruj' bohema oni min komprenus,
sed la verkoj, kiuj foje apartenos
al homaro, devas esti prikantitaj
per la lingvo, kiu sen la landaj limoj
sonos foje ĉie sur la tuta globo.
Ĉu ĝi estas eble nobla lingvo franca,
ĉu ĝi estas eble lingvo de Ŝekspiro
aŭ ĉu ĝi de Kant, aŭ Dante, aŭ de Tolstoj,
ĉu ĝi eble estas la belega lingvo
de antikvaj Grekoj, aŭ de Rom' potenca?

Vane mi vin uzus, ĉar vin nur komprenus
homoj, eble milionoj, sed mi volus
kanti al homaro, ne al multaj homoj,
ĉar nur la homaro foje ekkomprenos
la suferojn kaj dolorojn de nuneco.
Ĉu vi lingvo mia, mia Esperanto
povus al mi prunti sufiĉe da vortoj
por esprimi ĝin, per kio nun ektremas
ĉiuj fibroj niaj, landoj kaj aero,
ĉion kio en terura uragano
en konfuz' distalos, renaskiĝas?

Grandan pezan ŝarĝon sur min nun
prenante,

mi ne preĝos al vi, Musoj, Olympanoj,
sed humile mi sur teron falos
kaj al vi mi preĝos, Majstro, vi amata,
al vi Majstro, kiu en moment' ĉi tiu
al mi ekaperas.

Trajtojn viajn mildajn
mi rekonas, kaj mi aŭdas voĉon vian,
kiu sonas tiel dolĉe kiel sonis
foje voĉ' de tiu, kiu mondon savis.

Al vi mi nun preĝas, benon vian petas
por la verko granda, kiun entrepreni
mi kuraĝas. Ĉu vi helpen ne rifuzos?
Ĉu vi ankaŭ donos al mi la permeson
ke en la haoso de l'okazintaĵoj
vin mi ankaŭ nomu tuŝu vian gloron?
Mond' ne komprenebla estus sen Jezuo,
kaj ne komprenebla estus la eposo,
temp' en kiu estis ankaŭ Vi la rado . . .

El postlasaĵo de Dr. Stanislav Schulhof
(+ 1919).

KRONIKO

Se vi ankoraŭ ne aliĝis al al C. Asocio Esp.,
postulu de la sekr. (Rud. Hromada, Praha VII,
Sochařská 333) aliĝilon kaj poŝtan transpa-
gilon. Jarkotizaĵo por izotuloj 10 K.

Informu regule Asocion pri kunvenoj, pa-
roladoj, kursoj ktp. Informante centron, vi
samtempe informas viajn sambatalantojn en
aliaj lokoj.

Komitata kunsido de ĈAE. okazis la 24/11
en Praha. Ĉeestis prez. Dir. Eiselt, sekr. Hro-
mada, kasisto Novák, komitatanoj Pitlik, Ŝupichová,
Tittl. Krom tio S-oj Bouška, Kraus, Lukáš.
Unua punkto de la programo estis raporto de la
sekretario: Stato de ĈAE. Preso de specialaj
flugfolioj pri ĈAE. Starigo de konto ĉe Městská
sporitelna pražská. Havigo de aliĝiloj. Korespon-
daĵoj. Proponoj skribi venintaj de diversaj
samideanoj kaj rihatantaj la Kongreson estas
transdonataj al la Kongresa Komitato. Post la
raporto de la kasisto sekvis trankvila debato pri
la propono, ke Progreso aperu en Praha. Post
klarigo de S-ro Tittl, ke Plzeň ne konsentas,
oni ne voĉdonis. Koncerne la artikolon pli da
kunsento, S-ro Tittl promesis deklari en la
venonta n-ro, ke li ne intencis ofende tuŝi
S-ron Hromada nek la ceterajn Praha-anojn.
Pro malfrua tempo la debato pri la plua
programo (Organizita propagando en la tuta
respubliko) estis prokrastita al la venonta
kunveno. **Ĉiuj membroj de la Komitato kaj
Kontrola komisiono kaj iliaj anstataŭantoj,
krom tio ĉiuj samideanoj, kiuj havas intereson
je la revivigo de la sistema laboro propa-
ganda estas petataj esprimi letere siajn
opiniojn kaj proponojn.**

Praha. Krom kursoj anoncigitaj en la
lasta n-ro, gvidas kurson por 23 lernantinoj de
burĝa lernejo F-ino N. Silbersteckenová. Esper-
antista Klubo en Praha kunvenas regule
ĉiun vendredon. La 12/11 S-ro Pitlik parolis
pri J. A. Komenský kaj liaj opinioj pri lingvo
internacia. S-ro Hebký Jar., reveninta kiel
soldato el Siberio rakontis pri le esperanta
movado en la ĉeĥoslovaka armeo en Siberio.
Rondeto de E-istinoj aranĝas kurson
elementan (instr. F-ino Ŝupichová), historian
(la sama), superan (F-ino Dlouhá). Ĝi aranĝis
la 15/11 vesperon de Comenius. 94 partoprenantoj,
pli multe da neesper. publiko. Boheme parolis
F-ino Ŝupichová kaj S-ro Pitlik. Poemojn
recitis S-ro Steinsberg (eksmembro de la
Nacia teatro) kaj F-ino Dandová.

Budějovice. S-ro instr. Svačina instruas
same kiel la pasintan jaron en la knaba burĝa

lernejo. La 19/11 li parolis pri »E. kaj ĝia signifo en lernejoj« en la konferenco de instruistoj de la distrikto Budějovice. Al la ministerio de instruado estis sendita deziresprimio, ke estu nomita ekzamenanto de E. ĉe la ekzamenaj komisionoj por burĝaj lernejoj.

Bno. Kurson en Komerca Akademio gvidis S-ro Medek (12 p.). Nun li gvidas kurson en gimnazio.

Olomouc. Estas aranĝitaj 8 kursoj kun 200 u. S-ro Neužil instruas en kvar el ili (100 p.), S-ro Horák 40 p. S-ro Kudela 30 p. S-ro Rebiček 20 p., S-ro Wolf 6 p. Esp. Societo kunvenas de nun ĉiusabate je la 8a en hotelo »Merkur«.

Holešov. S-ro Loveček instruas E. en la II, III kaj IV. klasoj de knabina burĝa lernejo kaj en la 5. (lasta) kl. de elementa lernejo.

Bystřice p. Hostýnem. Kun permeso de la ministerio F-ino instr. Janalková instruas en la 2. kaj 3. klaso de la knabina burĝa lernejo. S-ro instr. Th. Čejka instruas E. en la knaba burĝa lernejo.

Fryšták u Holešova. F-ino Janalíková publike parolis E. la 21/11.

Fervojistoj kaj E. Sekve de la cirkulero de la fervoja direkcio en Olomouc kursoj de E. komencis en kelkaj pli grandaj stacidomoj de Moravio: Frýdek-Místek, Přerov, Mor. Ostrava, Uh. Hradiště k. a.

Konstantan rubrikon pri E. gvidas F-ino Šupichová en Malý Čtenář, gazeto por lernantoj, kaj en Časopis českých učitelek, gazeto por instruistinoj.

DIVERSAJŬOJ

La itala samideanaro, kiu de post 1913 (Milano) ne povis kunveni grandare, havis sian solenan Kvinan Kongreson en Bologna dum la 3., 4. kaj 5. de oktobro. En tiu Kongreso estis ankaŭ oficialaj delegitoj de diversaj Ministerioj, Provincoj, Komunumoj, Autoritatoj kaj gravaj Societoj. Senatano Pini malfermis la laborkunsidojn. Krom aliaj interesaj temoj, oni pritraktis precipe argumenton tre malnovan sed kiel en la Haga Kongreso nome: **organizado.** Post longa kaj fervora diskutado oni decidis, »ke la tuta itala esperantistaro bataladu kune sub unu flago, t. e. estu organizata en la F. E. I. (kiu ekzistas jam de post 1910); ke oni akceptu la proponojn de Prof. Alessio (pri starigo de Centra Oficejo); de S-ro Toschi (pri organizado), de S-ro Mandelli (pri propagando); ke la sidejo de la Centra Komitato estu Milano; kaj oni elektis membrojn de la Centra Komitato Doktoron A. Filippetti, Librotenistojn A. Mandelli kaj Doktoron P. C. Monti kun jenaj taskoj: modifi la regularon de la F. E. I. kaj fari aldonojn necesajn; organizi la italan samideanaron; eldoni unu monatan (se eble duonmonatan) oficialan gazeton; starigi Centran Oficejon de Esperanto; fari laŭ la disponotaj monrimedoj plej efikan propagandon por disvastigi nian lingvon kaj la internan ideon de esperantismo.« La nova adreso de la Itala Esper. Federacio estas, same kiel tiu de la redakcio de la oficiala organo Itala Esperantisto: Via Spiga, 29, Milano (Italio).

AL ĈIUJ SOCIALISTOJ!

»Liberiga Stelo«, tutmonda asocio de progresema laboristaro kaj esperantistaro, kun centra sidejo en Parizo kaj filio por Ĉeĥoslovakio en Praha invitas Vin al kunlaboro!

Ĉiu socialisto kaj progresema esperantisto, kiu ajn politikan konvinkon, ĉevas esti konstante kaj senerare informita pri socialista movado en fremlando. Kaj oni tion plej bone atingos per la aniĝo al nia programo, batalanta per ĉiuj rimedoj kaj fortoj kontraŭ antaŭjuĝoj de la nuna epoko, kontraŭ dogmoj kaj kapitalista sistemo kaj entute: kontraŭ ĉiuj baroj malebligantaj la unigon kaj liberigon de la laboristaro.

Internacia asocio »Liberiga Stelo«, kiu havas propran gazeton (Laborista Esperantisto) informantan pri tutmonda vivo socialista, garantias al Vi la eblecon por interkompreniĝi kiamaniere kun ĝia anaro, troviĝanta jam en ĉiuj landoj. Vi havos plej bonan okazon en senpera rilato konatigi tiamaniere kun ĉiuj socialistaj vojoj kaj direktoj celantaj tutmondan unuigon kaj liberigon de la proletario.

Ne hezitu kaj via interese aniĝu al niaj kunlaborantoj! Informpeton respondas: J. Petr, Vršovice, 125, Ĉeĥoslovakio.

ooo

FERVOJISTOJ ĈIULANDAJ ATENTU!

(Rilatas fakan vortaron!)

Estimataj samfakanoj! Mi prenis sur min la taskon, prepari la eldonadon de faka vortaro, por ni nepre necesa. La tasko ne estas facila sed mi certe esperas, ke mi finos la komencitan laboron, se ĉiu fervojisto-samideano helpos al mi. Do, karaj kolegoj, se vi deziras, ke esperanto fariĝu la oficiala ofica interkomprenilo, mi petas vin, helpu krei la verkon. Ĉar nur tiam ni povas realigi nian deziron, nur tiam ni konvinkos niajn administraciojn pri la utilo kaj la taŭgeco de nia lingvo, kiam ni posedas vere uzeblan fakan vortaron, kiu enhavas ĉiujn esprimojn por la oficiala korespondado ofica necesajn.

Rekomendinda estas la starigo de komisiono de fakanoj konsistanta el la ĉefaj landoj: Do, kolegoj, kiuj intencas konstante kunlabori estas petalaj sciigi al mi ilian nomon.

La laboro estas jena: Ĉiu el la anoj de tiu komisiono traduku la diversajn regularojn, precipe kaj unue la »Internacian Konvencion pri la transportado de komercaĵoj per fervojoj« (»Convention Internationale sur la transport de marchandises par chemin de fer«) kaj la formularojn uzatajn en la diversaj partoj de la fervoja agado. Kolegoj kiuj ne volas konstante kunlabori estas petalaj traduki la fakesprimojn, kolekti kaj sendi ilin de tempo al tempo al la subskribinto. Sed evitu la tro grandan specialecon.

Estas rekomendinde, ke kolegoj kiuj scias la francan lingvon aldonu al la esperanta esprimo krom la nacilingva esprimo ankaŭ la francan vorton.

Ni devas rapidigi la laboron por ke la vortaro estu prespreta ĝis la XIIIa en Praha.

Do, ni agu kaj laboru konstante senhalte! Ĉiuj gazetoj estas petataj represi ĉi tiun alvokon.

Georg Habellok,
Breslau, 10 (Germ.),
Schleiermachestrasse 19.

MIA DEKLARO.

En la lasta komitata kunveno de C. A. E. (24./XI.) esprimis so. sekret. Hromada la deziron, ke mi tie ĉi deklaru, ke per mia artikoleto »Pli da kunsento« en la nov. no. de »Progreso« mi ne volis lin ofendi. Mi tion faras tiom pli voĉonte, ĉar efektive similan intencon mi ne havis kaj mi esperas, ke la legintoj komprenis, ke la artikoleto tuŝas la ĝeneralan situacion entute, sed ne unu aŭ alian personon. Cetere mi tro ŝatas la personan laboron kaj la rezultatojn atingitajn por Esp. de so. Hromada, ol mi povus havi la ideon persone lin tuŝi. Mi efektive ĝojas, ke la minacinta malpacigo inter ni kaj mi estis forigita, ĉar pli ol antaŭe estas nun necesa la unueco kaj konkordo de ĉiuj ĉefoslovakaj esperantistoj.

Mi dankas al so. prezid. Eiselt kaj al ĉiuj komitatmembroj ĉeestintaj la kunvenon pro ilia tute neutrala kaj senpartia vidpunkto.

B. Tittl.

DEZIRAS KORESPONDI.

(La enpresado kostas 2 Kč.)

Jilemnice (Ĉeĥoslovakio). So. Jos. Hanka, studento de gimnazio koresp. per P. K. ŝanĝas P. M.

Kladno (Ĉeĥoslovakio). So. Václav Stříhavyka, oficisto, Thinfeld 1123, koresp. per P. K., markojn bildflanke.

Kladno (Ĉeĥoslovakio), Thinfeld 1123. So. Gustav Kindl, studento, koresp. per P. K., markojn bildflanke.

Nové Město n. Met. (Ĉeĥoslovakio). So R. Dvořák, studento, koresp. per P. K., ŝanĝas P. M., ĉefe kum skoltoj de ĉiuj landoj. Certe resp.!

Nové Město n. Met. (Ĉeĥoslovakio). Fino. V. Dvořáková, studentino, dez. koresp. per P. K. kaj ŝanĝi P. M.

Lisbono (Portugalia). Rua Jodo do Outeiro 16, III. So. Albino Costa, karesp. per P. K. kaj Let., ŝanĝas P. M., gazetojn kaj esp. glumarkojn.

Dopisnice s obrazem presidenta
T. G. MASARYKA
vydala admin. „La Progreso“
kus 30 hal., 10 kusů 270 Kč, 100 kusů 24 – Kč.

Esperantistó! Ĉtíte knihu Dr. Stan. Kamaryta:
O DVOJÍ PRAVDĚ
Pro naše předplatitele přímo v naší administraci za Kč 12.— místo za Kč 14.— poštou o Kč 165více.

Knihy, jež možno obdržeti v naší administraci.
(Při objednávce poštou nutno připočísti poštovné).

- B. Tittl: Slovník esperantsko-český, vázaný Kč 7.50
- Slovník esperantsko-český, brož. Kč 5.—
- Časopis »La Progreso«, roč. 1918 Kč 4.50
- Časopis »La Progreso«, roč. 1919 Kč 6.—
- Tittl: Krátká mluvnice Esp. Kč 0.30
- Čejka: Slovník esp.-čes., brož. Kč 7.50
- Čejka: Slovník čes.-esperantský Kč 3.—
- Esp. movado en Moravio Kč 4.—
- Kamaryt: Úvahy o jaz. mezinár. Kč 0.80
- Jazyk všeslovanský a Esp. Kč 0.20
- Kühnl: Úplná učebnice esperanta: c) celoplátěná vazba Kč 16.40
- Kühnl-Procházka: Slovník česko-esper.: b) brožovaný Kč 18.—
- Vortoj de Zamenhof, na lepším papíře Kč 6.—
- Šerlock Holmes Kč 4.50
- Výťah z Kotzina: Na obranu esper. Kč 2.40
- Co je esperanto Kč --.20
- Krestanov: Bulgara lando kaj Popolo Kč 12.50
- El proksima oriento Kč 9.—
- E. Privat: Vivo de Zamenhof Kč 48.—

Via horloĝo iros precize se vi ĝin donos por rebonigi al



Fr. Novák,
horloĝisto en Praha I.
Malé nám. 10.
Magazeno de horloĝoj kaj juveloj. - Vendejo de esper. signoj de Esper. klubo en Praha

Fildonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.